

LA JUNA BATALANTO

Organo de la Internacia
Katolika Junulara kaj Paca Movado

ELDONATA DE
MONDJUNULARO KATOLIKA, MOKA

Redaktoro: D-ro WILHELM SOLZBACHER.

ENHAVO :

1933 (de J. B.). — Paco kaj frateco, nia tasko (de Pastro Prof. John A. Ryan). — Ĉiu kristano konsideru kiel devon... (de Episkopo Scheiwiler kaj D-ro Mack). — Unu el la rusaj legantoj de La Juna Batalanto skribas... (de M. Vjatiĉ). — Por skoltoj kaj aliaj (de Lorcan Oh Uiginn). — Internacia Junulara Agado (Katolika Junularo — Protestantaj Junularo — Socialista Junularo — Studenta Junularo — La Skoltoj — Junulargastejoj). — La Rusa Seminario en Romo (de Studento Esperantista). — El la Esperanto-Movado — Sur Nia Librotablo (Recenzo de novaj libroj de internacia intereso). — Nia Movado.

Aldono : Towards an International Catholic Youth and Peace Movement — World League of Catholic Youth — La Juna Batalanto (kvarpaĝa varbilo en angla lingvo).

REDAKCIO : Köln — Dellbrück, Bensberger Marktweg, 63, Germ.

Eldonejo : ELDONA KOOPERATIVO LA JUNA BATALANTO,
Köln—Dellbrück, Bensberger Marktweg, 63, Germ. (Regina Solzbacher).

Presejo: imp. DISONAISE, J. Winandy, Dison. (Belgujo)

Abonprezoj de "La Juna Batalanto",

Normala abonprezo : jare 2 germanaj markoj, kun MOKA-membreco 3 M. La eldonejo akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, respondkuponojn, germanajn poŝtmarkojn.

Lando	jara abono	kun MOKA-kotizo	simpla kotizo	Lando	jara abono	kun MOKA-kotizo	simpla kotizo
Anglujo	3 s	4 s	1 s 3 d	Hungarujo	31 p	4 p	2 p
Argentino	1,50 p	2 p	1 p.	Italujo	9 l	14 l	5 l
Azio	3 s	4 s	1 s 3 d	Japanujo	3 s	4 s	1 s 3 d
Aŭstraliao	3 s	4 s	1 s 3 d	Jugoslaviujo	30 din.	40 d	15 d
Aŭstrujo	3,40 s	5 s	2 ^s	Litovujo	5 lit.	7 l	3 l
Belgujo	3,50 b	6 b	2 b	Luksemburgo	18 fr	25 fr	10 fr
Brazilio	4 mr	5 mr	2 mr	Meksiko	0,50 dol	0,75 d	0,30 d
Cehoslov.	16 kr	20 kr	10 kr	Nederlando	1,25 fl	2 fl	0,80 fl
Danujo	2 kr	3 kr	1 kr	Polujo	4z l	6 zl	3 zl
Danzig	2 g	3 g	1,20 g	Portugalo	8 esc	12 e	5 esc
Francujo	12 fr	18 fr	6 fr	Rumanujo	80 lei	100 l	40 lei
Germanujo	2 M	3 M	1,20 M	Svedujo	2 kr	3 kr	1 kr
Grekujo	38 dr	50	15 dr	Svisujo	2,50 fr	4 fr	1,50 fr
Hispanujo	5 p	8 p	2 p	Usono	0,50 dol	0,80 dol	0,30 dol

Ni akceptas ankaŭ pagojn por duona jaro aŭ kelkaj jaroj. Membroj de MOKA ricevas ankaŭ aliajn publikigaĵojn. Donacoj por la subtena kaso (liverado de J. B. al malriĉuloj) estas invitataj.

Abonejoj : Krom al la eldonejo oni povas ankaŭ pagi al la naciaj sekretarioj de MOKA.

Postkontoj : Germanujo : Köln 480 37 (Dr. Wilh. Solzbacher, Köln-Dellbrück); Francujo : Strasbourg 8180 (P. I. A. Muffang, Bourg-la-Reine); Aŭstrujo : Wien D 12.017 (Katholisches Kreuzbündnis für Oesterreich, Ortsgruppe Heiliges Feuer); Svisujo : Luzern VII. 2030 (Schweiz. Kath. Jungmannschaftsverband, Zug); Belgujo : 3313.51 (Imprimerie Disonaise, M. Jean Winandy).

AĈETU KAJ DISVASTIGU NIAJN PROPAGANDFOLIOJN KAJ BROŝUROJN!

- Mondjunularo Katolika**, kvarpaĝa informilo pri celo, historio, organizo kaj agado de MOKA (en Esperanto). 10 ekz. 0.25 RM, 50 ekz. 1.— RM.
- Les Œuvres Internationales de Jeunesse Catholique**, 40-paĝa broŝuro en franca lingvo, 2 fr. fr. (0.35 RM.).
- La Jeunesse Mondiale Catholique**, kvarpaĝa varbilo en franca lingvo 10 ekz. 1 fr. fr. (0.20 RM), 50 ekz. 4.— fr. fr. (0,70 RM).
- Dans 60 pays**, dupaĝa varbilo en franca lingvo. 25 ekz. 1.50 fr. fr. (0.25 RM).
- Towards an International Catholic Youth and Peace Movement**, kvarpaĝa varbilo en angla lingvo. 10 ekz. 5 d, 8 c (0.25 RM), 50 ekz. s 1/6, dol. 0.25 (1.— RM).
- Die katholische Jugend lernt Esperanto**. Kvarpaĝa varbilo por Esperanto (en germana lingvo). 50 ekz. 0.80 RM, 100 ekz. 1.50 RM.
- Die Katholische Weltjugendliga**. Moderna informo broŝuro pri MOKA en germana lingvo, aperinta 1932, 12 paĝa. 0.15 RM, 5 ekz. 0.50 RM.
- Die Katholische Weltjugendliga**. 16 paĝa broŝuro aperinta 1919. Plej bona informilo pri la historio de nia movado. 0.10 RM.
- Wir Katholiken und die internationale Jugendbewegung**. Von Hanns Sappl. 48 paĝa broŝuro aperinta 1921 kun antaŭparolo de episkopo Majláth, protektoro de MOKA. Grava por ĉiu, kiu deziras ekkoni la originojn de la MOKA-movado. 0.20 RM.
- Eldonejo LA JUNA BATALANTO**, Köln-Dellbrück, Bensberger Marktweg 63.

1933

Pli ol iam ĉiuj homoj parolas pri la misero kaj esprimas la esperon, ke la Nova Jaro alportu ĝeneralan pliboniĝon. Kaj miloj da profetoj donas al ni la kaŭzojn, kial tiu pliboniĝo nepre venos. Ni ne volas profeti. Ni ne scias, kio venos. Ni ĝojus, se baldaŭ la misero de la milionoj ĉesus, ni laboras kaj batalas por tio, sed ni scias, ke ankaŭ la nuna kaoso havas rolon providencian...

Ni eĉ ĝojas, ke ni ĝuste en la nuna tempo povas vivi kaj labori. Ni ja scias, ke nia epoko estas tempo de ŝanĝo ke venos tute grandaj aliĝoj en la mondo. Tiaj tempoj alportas terurajn suferojn kaj dolorojn, sed ili estas tempoj, en kiuj Dio ŝanĝas la vizaĝon de la tero kaj nove kreas la mondon. Kaj ni ĉiuj, se ni havas la ĝustan spiriton en ni, povas fariĝi humilaj instrumentoj de la Dia kreo...

Duoble granda estas nia tasko en tia tempo. Tute klare ni vidas, ke la katolika junularo, kiu pli facile povas liberiĝi de malnovaj antaŭjuĝoj kaj de laca rezignacio, havas pioniran taskon en la renovigo de la internaciaj rilatoj, en la efektiviĝo de paco kaj repaciĝo. Kaj nia kara lingvo Esperanto estas grava helpilo kaj potenca armilo.

Ni restos fidelaj! Ni estas pretaj al laboroj kaj oferoj! Ni fosos nian sulkon! Kaj je la komenco de la nova jaro ni ĉiuj, el kiuj ajn landoj kaj lingvoj ni venas, ni donas la manon unu al la alia. Oni neniam disigos nin. Ni lacoros kaj batalos. por ke fine de la jaro ni povu konstati : Ni faris nian devon!

La Princo de la Paco donu al ni sian benon! Kun lia helpo antaŭen!

J. B.

Paco kaj Frateco — Nia Tasko.

Profesoro en la Katolika Universitato de Ameriko, Washington.

La justeco postulas de la ŝtato, ke ĝi akcelu la pacon por siaj propraj membroj, dum ke la amo devigas ĝin, serĉi la saman celon por la bonfarto de si mem kaj de la aliaj nacioj. Tiuj devoj ne nur koncernas la registarojn, sed ankaŭ la popolojn, precipe tiujn personojn kaj organizaĵojn, kiuj povas ekzerci influon al la publika opinio kaj al la politikaj gvidantoj.

La unua kaj plej necesa afero estas eduko. La popolo bezonas instruon pri la universaleco de la frateco, la ebleco de daŭra paco kaj la trompo de senfina militpreteco. Kaj la ŝtatestoj devas konatiĝi kun la principoj de la internacia etiko.

Homa frateco devas esti profunde kaj vaste predikata al ĉiuj grupoj kaj klasoj, en teologiaj seminarioj, en universitatoj kaj lernejoj, en la preĝejoj kaj en katekisma instruado, en religiaj libroj kaj gazetoj. La kristanoj devas esti instruitaj pri la ĝusta spirita sinteno al ĉiuj alilandanoj. Ne sufiĉas diri, ke « ĉiu homo estas nia proksimulo ». La devoj enhavataj en tiu frazo devas esti klarigataj. Ili estu detale montrataj rilate al fremdaj rasoj kaj nacioj... Kaj tiu instruado devas esti ripetata kaj ĉiam denove ripetata. Efika instruado kaj vera lernado grandparte dependas de la simpla metodo de la ripetado.

La devoj de la patriotismo estu montrataj en pli limigita kaj balancita maniero, ol tio okazis ĝis nun. La homoj devas aŭdi, ke ne estas « dolĉe kaj bele, morti por sia patrolando », se la patrolando batalas por maljusta afero. Ne neante kaj malfortigante la senton de nacia patriotismo, ni povas meti antaŭen tiun pli saĝan kaj pli altan patriotismon, kiu ĉirkaŭprenas ĉiujn popolojn de la tero. Granda parto de ni ĵaŝ klopodoj en tiu kampo devas esti direktata klare, kuraĝe kaj obstine kontraŭ la spirito de ekskluziveco kaj malvasteco, kiu karakterizas tiun fuŝitan nacian senton, kies brulsigno nomiĝas naciismo...

La spirita sinteno de la homoj devas esti ŝanĝata kaj reformata rilate al la ebleco de la starigo de daŭra paco. Ĉiam unu el la plej grandaj malhelpoj al paco estis la laca penso, ke militoj devas veni, ke ĉiam estos militoj tiom longe, ke homoj estas homoj. Tiom longe ke ĉi tiu pesimismo daŭras, la plej granda parto de la homoj ne aliĝos al la afero de la paco. Tutmonda paco estas grandparte, se ne ĉefparte, afero de homa kredo. Kiam la plimulto kredos, ke la paco povas esti starigata kaj certigata, la paco vere estos starigata kaj certigata. Ni devas obstine montri, ke regno de la paco estas ebla, ĝis kiam tiu ideo kaj tiu kredo estos fariĝintaj reganta kaj efektiva elemento en la kutima pensado de ordinaraĵoj viroj kaj virinoj...

La granda devo, plenumi nian taskon por akceli la pacon internacian, estas ke ni serioze studu kaj laŭ niaj eblecoj kaj nia konscienco subtenu praktikajn proponojn kaj aranĝojn, por malebligi militon kaj certigi pacon... En la Letero al la Militantaj Popoloj (aŭgusto 1917) Papo Benedikto XV-a proponis, ke : la morala forto de la juro anstataŭu la materian potencon de la armiloj en la rilatoj inter la nacioj; la nacioj juste interkonsentu pri samtempa kaj reciproka malpliigo de la armilaroj; la brutala potenco de la armiloj estu anstataŭata per la nobla paca institucio de arbitracio kaj internacia juĝejo kun punoj al iu ŝtato, kiu rifuzus submeti konflikton al tia tribunalo aŭ akcepti la decidon de la juĝejo.

La anstataŭado de morala juro al materia forto, la ĝenerala malarmado, la deviga arbitracio por internaciaj disputoj, la starigo de plena sistemo de internacia juro, internacia tribunalo kaj ligo de nacioj, tio estas kompleta kaj unueca sistemo de praktikaj metodoj eblaj kaj necesaj por eviti militon kaj certigi pacon. En la nuna internacia situacio ili ĉiuj ŝajnas esti ne nur en harmonio kun, sed vere postulataj de la principoj de la moralo kaj la principoj de la internacia juro. Tutmonda paco ŝajnas esti neatingebla, se ne ĉiu el tiuj proponoj kaj postuloj estas iel realigata. Kiel sinceraĵoj de la paco ni havas la devon, ilin konsideri simpatie kaj serioze kaj subteni ĉion, kio laŭ tiu ekzameno ŝajnas al ni aprobinda. Se ni ne celas al la paco per taŭgaj kaj praktikaj metodoj, ĉiuj niaj packonfesoj estas malplenaj kaj vanaj. La devo, atingi celon, enhavas la devon, uzi la necesajn ilojn.

El la verketo « International Ethics ».

Ĉiu Kristano Konsideru Kiel Devon...

Paclaboro finfine estas anima laboro je la unuopulo, je ni mem, renoviga laboro en Kristo. Tial ĉiu kristano konsideru kiel gravan devon :

Neniam parole aŭ skribe uzi vortojn enhavantajn malamon aŭ ofendojn kontraŭ aliaj popoloj.

Neniam suspekti aŭ kondamni nacion ĝenerale aŭ en ĝia tuteco,

Neniam subteni aŭ disvastigi gazeton aŭ literaturon predikantan nekristanan ŝovinisman,

Neniam glori la militon kaj ne partopreni manifestaciojn servantajn al provokaj politikaj aŭ naciismaj celoj.

Ni bezonas malarmadon de la armiloj kaj de la koroj!

Mgr. Scheiwiler, episkopo de St. Gallen, kaj Pastro D-ro Mack, Luxembourg, trad. el « Schweizer Jungmannschaft » (speciala porpaca numero) Esperanto-Rondo de Krucligo, Wien.

Unu el la Rusaj Legantoj de la Juna Batalanto Skribas...

Antaŭ kelkaj semajnoj estis publikigata la dekreto, kiu fiksas por la malsupraj kaj mezgradaj lernejoj la libertempon kaj la septagan lernsemajnon : ses tagoj estas destinitaj por lernado, kaj la sepa — por ripozo. Antaŭ tio la lernejoj havis kvintagan kaj sestagan semajnon : kvar tagoj aŭ kvin tagoj estis destinitaj por la lernado kaj la kvina aŭ sesa tago por ripozo. La lernejoj de nia regiono akceptis por si dimanĉon kiel libertagon. Kelkajn semajnojn antaŭe la regnaj kaj sociaj organizaĵoj de nia regiono akceptis dimanĉon kiel libertagon por si. La ferioj denun estas fiksataj jene : la vintra libertempo de la 1-a ĝis la 15-a de januaro. Ĉar nia eklezio festas la religiajn festojn laŭ la malnova Juliana kalendaro, kies 25 decembro trafas la 7 januaron laŭ la Gregora kalendaro, la ĝelernantaro Kristnaske ne vizitas la lernejojn. — La printempa libertempo devas esti inter la 20 marto kaj 20 aprilo kaj la somera de la 5-10 junio ĝis la 1 septembro...

En la Leningrada fermita Kazana Katedralo estas malfermita sciencakademio muzeo de la religioj, kie troviĝas unikaj : aŭtentika sankta bildo de la Censtohova Dipatrino. Ĝia aĝo estas 500 jaroj. Ĝin liveris al Petrograd (nuna Leningrad) la heroo de la milito kontraŭ Napoleono 1-a : ĉefgeneralulo Kutuzov...

M. VJATIC.

POR SKOLTOJ KAJ ALIAJ.

Multaj personoj jam priskribis la interesan temon de la Esperantigo de la Morse-alfabeto kaj de la semaforo, kaj mi proponas por la diskuto jenajn metodojn.

Esperanto-Morse-Alfabeto.

Por lerni la Esperantigitan Morse-alfabeton, oni devas nur memori, ke

ĝ similas al Q,

ŭ similas al U,

ĉ similas al Y,

kaj estas tri novaj signoj :

h - - - -, j - - - -, ŝ ;

Tio estas la tuta regulo, kaj ĉiu skolto facile vidos, ke la lernotaj literoj estas tre simplaj, ĉar ili similegas al la nunaj ordinaraĵoj literoj. Krome, se ni esceptas la novan signon ŝ (. . . -), la novaj literoj ne estas multe uzataj.

Esperanto-Semafor-Alfabeto.

Por lerni la Esperantigitan Semafor-alfabeton, oni devas nur memori, ke :

ĝ similas al Q, kaj ĉ similas al Y, ambaŭ kiel la Morse-signoj,

h similas al Z, ŝ similas al X, j similas al W, ŭ similas al U.

Mi nur petas nun, ke iu, kiu volas proponi alian metodon aŭ ŝanĝon, antaŭe provu mian!

LORCAN OH UGINN, BAILE ATHA CLIATH,
IRLANDO.

Internacia Junulara Adago.

Katolika Junularo.

Franca-germana katolika junulara tendaro okazis 1-6 aŭgusto 1932 en Gerardmer (Francujo), 800 metrojn super la maro, en la Vosges-montaro. Partoprenis ĉ. 120 germanoj kaj 60 francoj. La germanoj venis el la katolika junulara ligo de la Krucmilitistoj (Kreuzfahrer-Jungenschaft), la francoj el la tri grupoj « Volontaires de la Paix » (« Libervolulo de la Paco »), « Scouts de France » (katolikaj skoltroj) kaj « Compagnons de St-François » (« Kunuloj de Sankta Francisko »). La tendaro estis tre sukcesa kaj donis multe da instigoj al ĉiuj partoprenantoj.

Katolikaj junulinoj germanaj kaj francaj kunvenis 14-21 aŭgusto en la junulargastejo de la Katolika Virina Ligo en Bendorf apud la Rejno (Germanujo). Pastro Rémillieux el Francujo, Pastro Liebelt el Germanujo, D-ro Nikolaus Ehlen (Germanujo) kaj kelkaj gvidantinoj el la junulara ligo de la germana Katolika Virina Ligo havis la spiritan gvidon. La kunveno, pri kiu oni nenion aŭdis en la publiko, donis riĉan gajnon al ĉiuj.

Pri la politika katolika junulara konferenco internacia, kiu devis okazi en Bruxelles, ni atentigis en la lasta numero de J. B. Bedaŭrinde la gvidantoj de MOKA, kiuj estus devintaj partopreni, subite estis malhelpataj. Ni ĝis nun ne ricevis raporton. Tamen ŝajnas, ke la belga konferenco, je kies okazo la internacia kunveno estis projektita, bonege sukcesis, sed ke la internaciaj interparoladoj pro la neĉeesto de multaj atenditaj delegitoj ne povis atingi multe. En la bankedo de la belga kongreso paroladis nome de la eksterlandanoj S-ro Cornilleau el Paris.

Protestanta Junularo.

Internaciaj konferencoj. La Kristanaj Asocioj de Junaj Viroj havis en *Haslev* (Danujo) Unuan Studsemajnon por agado inter la vilaĝana junularo. 19 gvidantoj el 9 eŭropaj landoj partoprenis kaj admiris la agadon en Danujo. — En *Stockholm* (Svedujo) estis regiona konferenco por nordaj landoj sub prezido de princo O. Bernadotte. Danujo, Svedujo, Norvegujo, Finnlando, Estonujo kaj Latvujo estis reprezentataj. Fondiĝis interrilata komitato por la partoprenintaj landoj. — En *Tizi Uzu* (Nordafriko) okazis konferenco de kristanaj (protestantaj) junularaj ligoj el nordafrikaj landoj. 100 delegitoj el Algerio, Maroko kaj Tunizio kunvenis sub prezido de Charles Guillon, sekretario de la Kristanaj Asocioj de Junaj Viroj (Genève). Oni decidis fondi specialan junularan gazeton por Norda Afriko, organizi ĉiujare regionajn konferencojn kaj unu landan konferencan kaj elektis profesion sekretariojn por tiu laboro, kies salajro por la unua jaro jam estas garantiita. Tio do signifus, ke la protestanta junularo en Nordafriko, en kiu la granda plimulto de la kristana loĝantaro estas katolika, povus ion efektiviĝi, kion la katolika junularo tie ĝis nun ankoraŭ ne havas (gazeton kaj profesion sekretariojn). — En *Oléron* (Francujo) okazis tendaro de protestantaj studentoj. Partoprenis pli grandaj grupoj de amerikanoj kaj francoj kaj malpli grandaj de angloj, germanoj, svisoj, ĉeĥoj kaj rusaj elmigrintoj. Oni raportas, ke estis iom malfacile, harmonie kunigi amerikanojn kaj eŭropanojn, sed ke la tendaro fariĝis interesa sperto por ambaŭ. — En *Mszana Dolna* (Polujo) internacia junulara tendaro de la KAJV (YMCA)-movado konsistis el 127 junuloj el Anglujo, Francujo, Germanujo, Hungarujo, Latvujo, Nederlando kaj Polujo. Cetere estas rimarkinde, ke en Polujo la movado havas sufiĉe multajn katolikajn membrojn malgraŭ avertoj de la episkopoj. Ĉiu vespero estis dediĉata al alia nacio, kies popolkantoj, dancoj, ludoj ktp. estis prezentataj ĉe la kampfajro.

La internacia gazeto World's Youth (Mondjunularo) aperas kvaronjare, ĉiu numero estas dediĉata al speciala temo. Kun intereso ni legis la jarprogramon. Aperos unu speciala numero pri Azio, en kiu la situacio de la protestanta junularo en Hindujo, Ĥinujo, Japanujo, Koreo kaj la Insuloj estos pritraktata.

NOVA ABONJARO komenciĝos per la venonta numero de J. B. Faciligu al ni la laboron per baldaŭna sendo de la abonkoto!

Socialista Junularo.

Io el la historio de la Socialista Junulara Internacio. En « Arbeiterjugend » (Laborista Junularo) la socialista gvidanto Hendrik de Man publikigis artikolon pri la fonda de la Socialista Junulara Internacio antaŭ 25 jaroj. Estas interese vidi, ke la batalo kontraŭ milito kaj militarismo estis la ĉefa instigo. Jen kelkaj detaloj: « La 30 septembro 1906 okazis en Mannheim la ĉefkunveno de la sudgermana Asocio de Junaj Laboristoj. Karl Liebknecht faris en ĝi paroladon pri la batalo kontraŭ la militarismo. Sekvante tiun paroladon kaj la rimarkojn, kiujn mi mem faris pri la temo, Ludwig Frank proponis, prepari la fondon de internacia unuigo de la socialistaj junularaj asocioj. La konferenco donis al mi la komision, surprizi la preparajn laborojn, kaj decidis organizi internacian konferencan okazo de la Internacia Socialista Kongreso en Stuttgart (1907). Mia laboro konsistis ĉefe en tio, ke mi faris enketon pri la socialistaj junularaj asocioj ekzistantaj en la diversaj landoj, ĝis kiam en marto 1907 provizora oficejo fondiĝis, kiu povis pli sisteme kaj intense fari la preparlaborojn. Ĝis tiam la kostojn de la korespondado mi mem devis pagi el miaj etaj enspezoj kiel laborstudento, kaj kompreneble per tio ne multe estis farebla. La provizoran oficejon pagis la du tiamaĵ socialistaj junularaj ligoj en Germanujo. Mi fariĝis sekretario kaj sukcesis havigi al ni ankaŭ konsultadon de la Internacia Socialista Oficejo en Bruxelles. Mi forgesis, kiom tio estis, mi tamen rememoras, ke ĝis la konferenco de Stuttgart la enspezoj estis 294.30 markoj, la elspezoj 300.60 markoj, kaj ke la defikto de 6.30 markoj faris al mi ne malgrandajn zorgojn. Tiuj modestaj financoj tamen sufiĉis, por serioze prepari la konferencan. Mi esploris, kio jam ekzistis en la mondo por la socialista junularo kaj publikigis la rezulton de mia enketo en broŝuro 84 paĝa, kiu — vera organiza miraklo en la tiama tempo — aperis jam unu monaton antaŭ la konferenco. Ĝi aperis en Leipzig anonime, ĉar mi devis eviti esti forpelata el Germanujo kiel « danĝera eksterlandano » kaj tial devis reteni mian nomon el la publiko. En diversaj okazoj mi prunteprenis la nomon de la tiama prezidanto de la belga Juna Gvardio Socialista, kamarado Vandemeulebroucke, sub kies nomo mi ankaŭ faris paroladojn. La Unua Internacia Socialista Junulara Konferenco okazis 24-26 aŭgusto 1907 kaj estis tre sukcesa. La duono de la partoprenantoj estis 20-jaraj junuloj, la alia duono pli aĝaj gekamaradoj. La organiza rezulto estis, ke definitive fondiĝis Socialista Junulara Internacio kun budĝeto disponanta jarajn kotizojn de ĉiuj aliĝintaj asocioj. La kulminaciaj punktoj de la konferenco estis la paroladoj de Henriette Roland-Holst pri la celoj de la socialista klerigo kaj de Karl Liebknecht pri la batalo kontraŭ la militarismo... Nur malofte okazis, ke internacia kunveno tiom influis la spiritan formon de iu movado, kiel la konferenco de Stuttgart tion faris al la agadirekto de la tiama socialista junulara movado. »

Socialista ligo por internaciaj personaj rilatoj. La Amikoj de Internacia Pionira Laboro (Fredika) estas organizaĵo por plifaciligi internacian vojaĝadon. En 28 landoj kaj 216 urboj ĝi nun jam havas grupojn, kiel ni legas en la Internacia Socialista Junulara Korespondado. Eksterlandaj socialistoj, kiuj vojaĝas en grupoj aŭ unuope, estas ĉiel subtenataj kaj trovas ĉie helpon kaj malmultekostan loĝadon kaj nutradon. Oni ankaŭ peras internacian korespondadon, interŝanĝon de libroj, ĵurnaloj kaj gazetoj, kaj kreas klubojn por lingvistado (speciale angla, franca, germana kaj hispana lingvoj estas akcelataj). Aperas gazeteto.

Studenta Junularo.

La Internacia Studenta Servo (ISS) havis sian XI-an Jaran Konferencan de la 27 julio ĝis la 3 aŭgusto en Brno (Ĉeĥoslovakujo). Ĝi decidis organizon de fakula konferenco pri la problemoj de la tro granda studentaro en la universitatoj kaj la senlaboreco de studentoj. Oni akceptis ankaŭ rezoluciojn pri pruntoj al malriĉaj studentoj, asekuro kontraŭ malsaneco, starigo de profesiaj konsilejoj, sociala laboro en la vilaĝoj, speciala situacio en Sudafriko k. a. La konferenco klarigis, ke la studento devas nepre klopodi esti en kontakto kun la laboristoj en industrio kaj minejoj, por konatiĝi kun la laborista vivo kaj faciligi al la laboristoj, kompreni intelektan laboron. Oni rekomendis laboradon de studentoj en fabrikejoj kaj labortendaroj, kvankam la nuna ekonomia situacio malfaciligas tion.

La Internacia Studenta Konfederacio (CIE) havis sian XIV-an Kongreson en Riga (Latvuj), 6-17 aŭgusto 1932. La ĉelpunktoj de la programo estis: senlaboreco kaj profesiaj konsilejoj, statistiko de studentoj kaj rilatoj al internaciaj institucioj. Oni faros grandan enketon pri la senlaboreco. Ankaŭ estas larita la propono, ke okazu internacia premi-konkurso pri la senlaboreco de intelektaj laborantoj kaj la ebleco de la solvo. La juĝa komitato konsistu ĉefe el reprezentantoj de la Internacia Labor-Oficejo, de la Internacia Instituto por Intelektua Kunlaboro (Paris) kaj de la CIE. — Rilate al la statistiko oni akceptis difinon de la vorto « studento ». Jen ĝi estas: « Studento estas iu persono vira aŭ virina almenaŭ 17-jara, kiu estas enskribita membro de institucio, kiu donas sciencajn gradojn rajtigantajn la posedanton eniri rekte unu el la tiel-nomataj liberalaj profesioj ». — La statistiko estonte donu por ĉiu lando jenajn nombrojn: tuta nombro de gestudentoj, procentaĵo el la loĝantaro de la lando, procentaĵo de la samnaciaj studentoj kiel procentaĵo el la loĝantoj 17-35-jaraj; eksterlandaj studentoj kiel procentaĵo de la nombro de eksterlandanoj loĝantaj en la koncerna lando; la absoluta kaj relativa dispartigo de la studentoj laŭ fakultato, sekso kaj nacieco; la nombro de studentoj el la kvin naciecoj plej forte reprezentataj; la nombro de studentoj samnaciaj studentaj eksterlande kaj ilia dispartigo laŭ la 5 plej gravaj landoj; kaj statistiko laŭ religioj en landoj, kie tiu informo estas oficiale postulata.

La skoltoj.

La Tutmonda Skolta Jamboreo, kiu okazos en ĉi tiu somero en Gödöllő apud Budapeŝt kaj kunvenigos multajn milojn da skoltoj el ĉiuj landoj kaj mondpartoj, kompreneble nun estas la ĉefa afero en la skolta mondo. Estas ĝojige, ke per la agado de la Hungara Skolta Esperanto-Studrondo, kiu estas oficiala sekcio de la Hungara Skolta Asocio, kaj de la Skolta Esperantista Ligo nia lingvo havas bonajn ŝancojn, por esti uzata kaj propagandata en tiu giganta tendaro. Aperis skolta fakvortareto de 300 vortoj eldonita de la jamborea oficejo en 5 lingvoj por hungaraj skoltoj. La kvina lingvo estas Esperanto. Hungara Skolta Asocio eldonis oficialan ŝtofinsigneton por interpretistoj « Esperanton parolas ». Se en iu nacia trupo estos kelkaj skoltoj, kiuj bone scias Esperanton, ili povas peti oficialan Esperanto-interpretiston. Centran renkontejon por Esperantistaj skoltoj aranĝos laŭ oficiala komisiono de la jamborea estraro la budapeŝta skolttrupo N-ro 199 en sia tendarloko. Tie okazos kunvenoj de Skolta Esperantista Ligo, tendarfajro, paroladoj kaj Esperanto-ekspozicio. Eksterlandanoj ĉiam trovu hungarajn skoltojn, kiuj scias Esperanton. El la trupo 20 skoltoj lernas, parte jam scias Esperanton. La Hungara Skolta Esperanto-Studrondo eldonis belajn glumarkojn pri la Esperanto-kunveno en la jamboreo (prezo: 4 Respondkuponoj por 100 glumarkoj; adreso: Budapeŝt V., Nagy Sandor-u. 6).

Junulargastejoj.

Unua Internacia Konferenco de la Asocioj por Junulargastejoj okazis en novembro 1932 en Amsterdam. Anglujo, Belgujo, Ĉeĥoslovakujo, Danujo, Francujo, Germanujo, Nederlando, Irlando, Norvegujo, Polujo kaj Svisujo estis reprezentataj, do 11 eŭropaj landoj. Kiel prezidanto estis elektata kun granda aplaŭdo la pioniro de la ideo de junulargastejoj, Richard Schirrmann, instruisto en Altena (Germanujo). El tute malgrandaj komencoj per la konstanta obstineco de Schirrmann kaj liaj helpantoj ja estiĝis la reto de la pli ol 2000 germanaj junulargastejoj, kaj en multaj aliaj landoj oni imitis la aferon. La junulargastejoj donas al la migrantaj gejunuloj bonegan okazon por restadi kaj dormi en malmultekostaj, puraj kaj simplaj ejoj, ĉar ja hoteloj pro diversaj kaŭzoj ne taŭgas por tio. En la Amsterdama konferenco la celo estis la reciproka rekono de la legitimiloj, kaj oni esperas, ke tiu celo jam povas esti atingata en la dua internacia konferenco okazonta en Germanujo. Daŭra interŝanĝo de spertoj per cirkuleroj kaj plejebla egaligo de la organiza sistemo estas decidita. — La junulargastejoj estas por la junularo de ĉiuj klasoj, politikaj opinioj kaj religioj. La sinteno de la katolikoj al ili estas bedaŭrinde malsama. En kelkaj landoj (ekz. Germanujo) ili oficiale kunlaboras, kaj la katolikaj junularaj ligoj estas reprezentataj en la estraro, en aliaj landoj (ekz. Nederlando) katolikoj estas retenigemaj kaj preferus krei reton de katolikaj junulargastejoj.

NUN ESTAS TEMPO, por gajni novajn abonantojn! Komenciĝas nova abonjaro! Nia gazeto estas via gazeto. Faru vian devon!

Towards an International Catholic Youth and Peace Movement

In a world of misery, depression and international hatred, in a period of steady preparations for the next war in spite of all progress of international law and all solemn declarations in the Kellogg Pact, an international league of young volunteers, who are willing and pledged to stand for peace and international brotherhood, need not talk very much about the reason for its existence. If such a group has succeeded in bringing together enthusiastic fellow-workers from practically all countries of the world, if they put all their courage and all the vigour of the younger generation into their big task, if they try to become free of the narrowmindedness and unreasonable prejudices of the older generations who were not able to prevent the World War, they have got a message and a mission to the world's youth. If their beliefs are based upon the eternal truth of Christ, if they live in the community of his holy worldwide Church and take the peace teachings of the Popes as standards of their activity, they may be able to make an efficacious contribution towards the realization of « the Peace of Christ in the Kingdom of Christ ».

The World League of Catholic Youth originated during the Great War. In 1917, the World Peace League of the White Cross with its headquarters in Graz (Austria) had been established by Catholics of various countries and strove for a better response among Catholics to the efforts of the Pope for the speedy restoration of World Peace. They had to contend with great difficulties, because the majority of Catholics in many countries had become victims of an unchristian war spirit. Within the league, some young people and leaders of the youth movement formed a special group, known under the Esperanto name Mondjunularo Katolika (i. e. Catholic World Youth, MOKA by short). Immediately after the war, the Peace League of the White Cross published an appeal, signed by leading Catholics from 8 countries, including bishops, priests and well-known authors. In 1919, the youth group issued its first public appeal, from which we quote some sentences: « This time challenges us to awakening and action. The old world has been dashed into pieces, and a new era is rising. Some time ago, the French Socialist paper L'Humanité published an appeal to students all over the world, calling them to organize an international exchange of ideas and to realize the spiritual unity and brotherhood of all mankind. Are those to act and we to stand for ever behind? Are we not Catholics who ought to think and to work universally? Did our Divine Master not bring to us the message of love and pardon? If this love is living in us, it will compel us to understand our neighbours and to bury definitely the hatred which had separated us... Peace dreams are insufficient, we have to work practically for the reconciliation of the nations... The propaganda of the easy and useful international auxiliary language Esperanto is an excellent means for our action ». The definite foundation of the World League of Catholic Youth took place in The Hague, in 1920. The International Secretariat was at first at Graz (Austria) and is now at Cologne (Germany).

The chief object of our league has been from the beginning, to build up international friendship between young Catholics, particularly from countries whose governments are or have been in conflict with each other. Conferences, International Friendship Camps and weekend meetings near the frontiers have been organized. Correspondence, study tours and an information service, which reached individuals as well as youth magazines and sometimes the great press, were means by which we sought to achieve a better understanding and a fraternal cooperation. Links of friendship have been tied between Germans and Frenchmen, Germans and Belgians, Poles and Germans, Austrians and Czechs, Europeans and young Catholics in the Far East, China, India and Japan. The International Secretary has visited youth groups and addressed audiences in practically all European countries and in America. The French Secretary has done the same in Germany, the German Secretary in France, Belgium, Holland, Switzerland and Spain, the Austrian Secretary in Czechoslovakia, Hungary, Poland, Germany, Switzerland and Italy. The former Secretary for Palestine has visited youth groups in several European countries. The former Chinese Secretary, a young native Franciscan friar, who is now continuing his studies in Rome, has made use of his long tour from Central China to Europe, to spread the ideas of the World League of Catholic Youth and to visit interested groups and personalities.

It had been one of our chief objects, to promote the establishment of a big Catholic Youth International, composed of all Catholic youth associations in the world. Some time after our foundation, an initiative towards such a cooperation came from outside our movement. The Italian Catholic Youth Association invited representatives of the most important foreign associations for a Conference to be held in Rome, in September 1921. The World League of Catholic Youth sent two delegates to this Conference which led to the formation of an International Secretariat of Catholic Youth Associations with headquarters in Rome and with the chief object of organizing regular International Catholic

Youth Congresses. The World League of Catholic Youth, which had already made efforts in the same direction and had secured the affiliation of a certain number of associations with a total membership of 80,000, decided to leave the coordination of the big associations to the Roman office and to concentrate its work on the formation of an elite group for peace and international cooperation and on the establishment of practical services to bring about international friendship among individuals. Unfortunately, the International Secretariat in Rome had to be dissolved in 1927, owing to internal difficulties in some affiliated organizations. So we Catholics have at present nothing which could be compared with the Socialist or Communist Youth International or the World Alliance of Young Men's Christian Associations. The World League of Catholic Youth is trying to foster the interest of Catholic youth for international problems and to prepare a spiritual and psychological basis which will later permit the building up of a mighty Catholic Youth International. We have already succeeded in bringing together leaders of various national associations and in promoting friendship among them, and we could easily do much more, if more funds were available for this purpose.

The activities of our local Delegates, local groups and National Secretaries are various, though they all serve the same idea. In one place, for instance, our group has founded a complete evening school with separate study clubs for international relations, peace education and languages (Esperanto, English and French). Some groups organize study tours abroad or circulate foreign magazines, some have children's clubs. In some places, young foreign Catholics are brought together. When, some time ago, a German member was ordained priest in Rome, the International Committee asked two other Roman members to take him the congratulations of the League. Of these, one was Russian and the other Chinese. In Germany, the national branch of the World League of Catholic Youth is affiliated to the Catholic Youth of Germany, and belongs, therefore, officially to the Catholic Action of that country. In some countries, our study clubs and committees have been the first which were able to bring together for common activities leaders of different Catholic youth associations which had no contact with each other.

There can be no doubt that the chief mechanical obstacle to international cooperation lies in the difference of languages. We badly need an international auxiliary language. The World League of Catholic Youth has had excellent experience with Esperanto and is promoting in every way the study and application of this easy and useful means of intercourse. The Catholic Esperanto movement which has been blessed and encouraged by the Popes Pius X., Benedict XV. and Pius XI. has to make a wonderful contribution towards a better international understanding and cooperation of Catholics all over the world. Let us all learn Esperanto, and we shall do a better service to our cause than we can do by vague talks and discussions. Such a well-known scholar and internationalist as Professor Gilbert Murray of Oxford University was perfectly right in saying: "I think there are few more profitable ways in which a man can now spend his leisure than in thoroughly mastering Esperanto."

All the activities of the World League of Catholic Youth are just small beginnings and they do not yet mean any power to change the real world. But we believe that by continuing and developing our work we shall have increasing possibilities to make our contribution towards the building up of a new mankind, based upon justice and love. With the blessing of God and with the help of many friends from many countries we are determined to go on. We need helpers. Are you prepared to assist us?

WORLD LEAGUE OF CATHOLIC YOUTH

Some dates from our history: Cooperation of young Catholics from various countries in the World Peace League of the White Cross, 1917. Public appeal for the formation of a World League of Catholic Youth, 1919. Definite foundation in The Hague, 1920. Congresses: Graz (Austria) 1921, Luxemburg 1922, Constance (Germany) 1923, Lugano (Switzerland) 1924, Oxford (England) 1925, Barcelona (Spain) 1929. International Conferences on particular problems: Clervaux (Luxemburg) 1926, Warsaw (Poland) 1927, Venlo (Holland) 1929, Loeven (Belgium) 1929, Torino (Italy) 1929, Altenberg (Germany) 1930, Cologne (Germany) 1931. Participation in the organization of some 60 other international gatherings and campaigns, the most important being: Congress "Peace through the Youth", Bierville (France) 1926; World Youth Peace Congress, Erde (Holland) 1928; International Meeting of Catholic Labour Youth, Budapest (Hungary) 1930; Camp of East European Youth Leaders, Sromowce (Poland) 1930; International Catholic Youth Exhibition, Brussels (Belgium) 1931; European Youth Disarmament Crusade, 1932.

Encouragements from the Holy See and ecclesiastical authorities: The Holy Father, Pope Pius XI., blessed the league in a letter of his Secretary of State to its Protector, Bishop Majlath, on February 15th, 1930. Since our first Congress, Bishop Majlath of Transylvania (Rumania) has been Protector of the World League of Catholic Youth and its permanent adviser. Some 30 Cardinals, Archbishops and Bishops have encouraged the league by personal assistance to Congresses, letters of blessing and financial support.

Organization: Hon. Secretaries in 23, Delegates and members in 40, readers of the international organ in some 80 countries. The International Secretariat has relations with and addresses from more than 100 countries. — The league is to be represented in each country by a Secretary, assisted by a National Committee, with Delegates in each important centre. Delegates organize local groups of the World League of Catholic Youth, if that is possible and useful under the local conditions, or they may work within existing organizations, spreading the ideas of the movement and encouraging the utilization of its practical services.

Membership: Active members take part in the practical activities. They are expected to study international relations and the Catholic attitude towards them, to help foreign friends by information and assistance, to learn the international auxiliary language Esperanto, in order to be able to communicate directly with friends all over the world, to do propaganda work and to pay a membership fee. — Supporting members pay an annual contribution. — Corporate membership is open to groups and organizations which agree with the league's purposes and give their moral and material support. — The minimum membership fee for all categories is s 1/6 or dollar 0.30, or, including subscription to the international organ, s 4/- or dollar 0.80.

International Correspondence is an important and cheap means of building up international friendships between young Catholics. The service is at the disposal of everybody who sends in name and address, statement of age, profession, particular interests and knowledge of languages (many friends abroad ask for correspondence in English, Esperanto gives the best chance). — Holiday exchange and assistance in your trips abroad can be arranged for.

Information service: The International Secretariat is in intimate communication with the Catholic Youth Movement and the Peace Movement in all countries. In this connection, it may even be the best-informed office in the world, and hundreds of hints are regularly given to individuals and groups who ask for them.

Esperanto: The chief difficulty in each form of international cooperation is the Babelic language confusion. In order to secure a strong unity and solidarity among all members, which is more than a communication between some polyglot leaders, we have adopted Esperanto as international language. Dr. Zamenhof's language, composed of the elements of Aryan tongues, is extremely easy to learn, has rapidly spread throughout the world and has shown itself highly effective for international intercourse of every kind. We can supply full material for self-tuition (see order form).

LA JUNA BATALANTO ("The Young Warrior") is the official organ of the league, published every second month and edited in Esperanto. It has already readers and contributors in some 80 countries. Hundreds of papers and magazines have spoken in sympathetic terms of this bulletin or have translated articles from it.

Other publications: Pamphlets and booklets have been published in several languages, up till now chiefly in Esperanto, German and French. Printed or mimeographed bulletins or magazines have been published by the International Secretariat or national branches in Esperanto, German, French, English, Spanish, Italian, Hungarian, Polish, Danish, Catalan and Chinese.

Finance: Lack of funds is a serious obstacle to more efficient activities. Membership fees, subscription rates and donations have hardly met the most urgent needs. Most members are poor and already make remarkable sacrifices in their local work. For many years, there has been no paid officer in the movement, everything being done by volunteers. We need absolutely more friends of peace and friends of the Catholic youth movement, willing to support our work by an annual contribution.

Next steps: What we want to achieve first are the following: 1. consolidation and improvement of our existing services, 2. regular study weeks of Catholic youth leaders on current problems of the international life, 3. publication of a Handbook of the International Catholic Youth and Peace Movement, 4. regular publication of a newsheet in several languages, sent to Catholic youth associations and to the press, 5. an effective campaign for the study and application of Esperanto in Catholic circles, 6. development of a better financial basis.

In English-speaking countries we have Delegates and sympathizers in England, Ireland, The United States of America, Canada, British West Indies, Egypt, India, Australia and New Zealand, but organized national branches have not yet come into existence. Suggestions are invited and should be addressed to the International Secretary.

International Committee: Protector: Mgr. Dr. G. K. Count Majlath, Bishop of Transylvania, Alba Julia, Rumania. **International Secretary:** Dr. Wilhelm Solzbacher, Bensberger Marktweg 63, Köln-Dellbrück, Germany. **National Secretaries:** A. Björnstad (Norway), M. Calvo (Argentina), Rev. M. Caroli (Italy), A. Chang (China), S. Csora (Rumania), Rev. S. Ester (Spain), J. Filip (Czechoslovakia), H. Freibergs (Latvia), J. M. Hashimoto (Japan), H. Kolvenbach (Germany), Rev. L. Kosyrczyk (Poland), V. Kunic (Yugoslavia), W. Mudrak (Austria), P. J. A. Muffang (France), Rev. L. Németh (Hungary), I. Nunez (Peru), J. A. Renwick (Australia), F. W. Stannard (Great Britain), L. Oh Uiginn (Ireland), E. Vogt (Switzerland), Rev. L. Wolff (Denmark), R. Zeballos Morales (Uruguay).

LA JUNA BATALANTO

(« The Young Warrior »), Organ of the International Catholic Youth and Peace Movement, is edited by the World League of Catholic Youth and has its readers and contributors in some 80 countries. Let us quote some appreciations :

A bishop : I hope the new volume of LA JUNA BATALANTO will do as much good as its issues in former years.

The Rt. Rev. G. K. Count Majlath, D. D., Bishop of Transilvania, Rumania.

A well-known theological writer : I always have considered Esperanto as a great means in the service of great aims. I am glad that LA JUNA BATALANTO understands so well those aims.

The Rt. Rev. A. Dambrauskas, D. D., Professor, Kaunas, Lithuania.

Catholic dailies in various countries : An international tribune of Catholic youth leaders... Germania, Berlin. — The important Esperanto magazine of the World League of Catholic Youth... El Debate, Madrid. — LA JUNA BATALANTO should be of use for every Catholic, interested in international life...The Daily American Tribune, Dubuque, Iowa.

A young Chinese Franciscan friar : We can be proud of LA JUNA BATALANTO. We young Chinese Catholics, too, shall support it vigorously.

Rev. P. Joh. Bapt. Kao, O. F. M., Tung-Yuen-Fang, at present in Rome.

A Japanese Jesuit : I have to thank you very much for the interesting copies of LA JUNA BATALANTO.

Rev. P. Fr. X. Abe, S. J., Japan.

A non-Catholic leader of the peace movement in Sweden : I am not a Catholic, but I wish to thank you wholeheartedly for the chief article in LA JUNA BATALANTO. Words of that value have never been spoken to the Protestant youth in our country.

Werner Oedegard, Editor, Hudiksvall, Sweden.

LEARN ESPERANTO

by self-tuition, and read LA JUNA BATALANTO. You will rapidly become familiar with the application of the international auxiliary language in the cause of world peace and friendship. Make use of our suggestion by filling in and sending back the attached application and order form.

Strike out what you do not want and send back this form.

The International Secretary,
World League of Catholic Youth,
Bensberger Marktweg 63,
Köln-Dellbrück, Germany.

Please enrol me as active member. I am ready to serve as local Delegate, unless a Delegate has already been chosen. I shall pay an annual contribution of

I cannot take part in your activities, but I wish to support the movement by a donation — an annual contribution — of.....

I want to learn Esperanto by self-tuition and to be introduced into its application in the International Catholic Youth and Peace Movement. Please send me a textbook, a small vocabulary (Esperanto-key), an easy reading-book, the League of Nation's Report on Esperanto and the magazine LA JUNA BATALANTO for one year, for which I enclose (this includes the membership of the league) 6 Shillings or one U. S. Dollar.

I want to get a correspondent — several correspondents — abroad. I understand (state knowledge of languages) and am particularly interested in

I am already member of (if you belong to any club or organization, state here the names)...

NAME :

ADDRESS :

AGE AND PROFESSION :

(Signature)

Money can be sent by Bank Notes, international Postal Order or Cheque. Cheques and Postal Orders should be made payable to Dr. Wilhelm Solzbacher, Köln-Dellbrück.

La Rusa Seminario en Romo.

Ju pli la situacio de la kristana kredantaro en Rusujo pligraviĝis, des pli nia Papo Piŭ XI-a kompatis ĝin. Precipe la persekutado al la Eklezio kaj kredantaro, la sakrilegioj kaj la krimoj de Dion malamanta ŝtato, la malmorala edukado de la junularo lasas sangadi la koron de la Paŝtisto de ĉiuj animoj. Sed la Sankta Patro ne restis senaga. Li tuj ekhavis la planon, konstrui seminarion, kie sin povas prepari pastroj kaj pastrokandidatoj por la malfacila laboro en la stepoj de Rusujo. En tiu seminario la pastrokandidatoj studus kaj ekzerciĝus speciale en tiuj sciencoj kaj konoj, kiujn ili bezonas en Rusujo. Sed komence la plej necesaj kondiĉoj mankis, kaj oni devis atendi helpon. Tiucele la Papo invitis, preĝi al la Sanktulino de la Karmelo, Sankta Terezio de la Infano Jesuo, kiun li jam estis proklaminta kiel patronino de Rusujo. Kaj vere la sanktulino helpis, ĉar en la jaro 1927 la papo ricevis el Lisieux grandan sumon da mono, kiu proksimume sufiĉis por la konstruo de la kolegio. Tuj en 1928 oni komencis la konstruadon.

Nun leviĝas sur la Eskvilino apud la baziliko de Santa Maria Maggiore inda konstruaĵo : la Rusa Kolegio (Collegium Russicum). Apud la Kolegio troviĝas la rusa preĝejo, kiu estis inaŭgurata je la Festo de Kristo-Reĝo, la 30 oktobro 1932, laŭ la belega orienta rito.

La celo de la seminario estas la eduko de rusaj junuloj de slava rito al pastreco, sed oni akceptas ankaŭ junulojn el ĉiuj nacioj, kiuj volas dediĉi sin al tiu laboro en Rusujo per slava rito. Nun en la seminario jam troviĝas rusoj, slovakoj, ĉeĥoj, poloj, germanoj, aŭstroj, holandanoj, rumanoj kaj blankrusoj. Ĉiuj promesas, ke ili post sia paŝtrigo laboros en aŭ por Rusujo kaj obeos la dezirojn de la papo. La filozofiajn kaj teologiajn studojn la studentoj sekvas en la Papa Universitato Gregoriana, kaj en la seminario mem okazas kursoj pri rusa, itala kaj slava eklezia lingvoj kaj ankaŭ en eklezia kantado laŭ slava rito, plue en literaturo kaj historio.

Specialajn zorgojn oni havas pri la karakterformado, por ke la alilandanoj ne plu estu tiaj, sed fariĝu rusoj. De ili estas postulata vera heroa animo kaj arda fervoro por la animoj, sinofero kaj sindonemo. Ankaŭ kondiĉo estas rezigno je ĉiu honoro aŭ honora ofico, ĉar neniu estas certa, kie li estos laboranta, ĉiam necerteco, ĉiam danĝero.

La kandidatoj devas ankaŭ esti pretaj je martireco, je martiriĝo ĉiuspeca, ĉu per tuja mortigo ĉu per malrapida mortado en minejoj en punlaboro, sen sufiĉa manĝaĵo, en la malvarmeo de Siberio. La kandidato devas esti preta, oferi ĉion, fari ankaŭ tiajn oferojn, kiujn li antaŭe ne povas imagi al si. Ĉiam preta!

Nun troviĝas en nia Kolegio 20 studentoj, kaj ni atendas el ĉiuj mondpartoj ankoraŭ aliajn, kiuj, kondukataj de la Sankta Spirito, venos al ni.

Mi ĝojas, ke per Esperanto kaj per LA JUNA BATALANTO mi povas paroli al tiom da junuloj el tiom da landoj. Lasu viajn amikojn legi ĉi tiun artikolon, traduku ĝin en viajn lingvon, por ke ĉie ĉiuj iom scias pri ĉi tiu seminario, kiu volas servi la landon, kiu okupas la sesan parton de la mondo!

Adreson vi havas ĉi sube, de kiu vi povas ricevi aliajn informojn.

Studento Esperantista, Kolegio Rusa,
via Carlo Cattaneo 2, ROMA, Ital.

El la Esperanto-Movado.

Universala Federacio Esperantista (UFE) estas la nomo de nova organizo de la neŭtrala Esperanto-movado laŭ projekto de la komitato elektita de la Pariza kongreso. Ĝi devus anstataŭi samtempe la ĝisnunajn K. R. kaj UEA. Sed UEA ne konsentas, kaj ankaŭ kelkaj gravaj naciaj asocioj ne aprobis la projekton.

La 25-a Universala Kongreso de Esperanto en Köln okazos de la 29 julio ĝis la 5 aŭgusto. Adreso : Köln, Trajanstr. 25. Ĝis la 31 decembro 1932 jam aliĝis 302 kongresanoj el 24 landoj : Anglujo 30, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 5, Belgujo 13, Ĉeĥoslovakujo 13, Danujo 2, Danzigo 1, Finnlando 1, Francujo 38, Germanujo 121, Hispanujo 10, Hungarujo 3, Italujo 9, Japanujo 1, Jugoslavujo 1, Nederlando 22, Nederlanda Hindujo 1, Polujo 14, Rumanujo 1, Saar-Regiono 1, Skotlando 4, Svedujo 4, Svisujo 6.

Inter katolikaj skoltoj Esperanto ĉiam pli gajnas influon. En Slovakujo nia amiko Alojz Macek agadas kaj regule publikigas Esperanto-notojn en la katolika skoltgazeto, en Irlando same agas nia amiko Oh Uiginn. En Aŭstrujo grandkvanta propagandilo estas disdonita kaj nia amiko Jakob atakas la Skoltojn de Sankta Georgo. La jarkunveno de la Angla Ligo de Katolikaj Esperantistoj preparolis propagandon inter katolikaj skoltgvidantoj. En 's Hertogenbosch (Nederlando) katolikaj skoltoj lernas Esperanton kiel preparo por la Jamboreo. La Flandra Katolika Skolta Ligo (Belgujo) havas specialan Esperanto-sekretariejon, kaj niaj gelegantoj jam scias, kiom klopodadas la skoltoj en Hungarujo, kies plimulto estas katolika.

La Angla Ligo de Katolikaj Esperantistoj ricevis por sia jarkunveno (8 novembro 1932) leteron de la episkopo de Southwark dezirantan plenan sukceson al la movado. La kvartonojara bulteno BRITA KATOLIKO aperas regule.

La Katolika Unuiĝo Esperantista en Wien havis la 21 decembro belan Kristnaskokunvenon. En Krems okazis solena transdono de la honorsigno de la aŭstra respubliko al Pastro Meštan, honorprezidanto de KUE kaj eksprezidanto de IKUE.

ESPERO KATOLIKA eldonis en oktobro 1932 interesan specialan numeron je la Festo de Kristo-Reĝo. Aperas en daŭrigoj Parolanta Filmo pri la Katolika Esperanto-Kongreso de Lourdes.

Germana Ligo de Katolikaj Esperantistoj komencis publikigadon de pli ampleksaj cirkuleroj multobligitaj. Ni deziras al la laboro de S-ro Brucks bonan sukceson, tamen dezirus, ke rimarkoj evidente malveraj (ekz. Espero Katolika — la sola katolika Esperanto-gazeto) aŭ aludantaj en stranga maniero pri nia movado ne ripetigu.

La Katolika Radio-Disaŭdigo (K. R. O.) en Nederlando depost decembro 1932 anoncas siajn Esperanto-disaŭdigojn ankaŭ en Esperanto. La katolika radio-gazeto regule enhavas liston de Esperanto-disaŭdigoj en la tuta mondo.

La protestanta Esperanto-movado plivigliĝas. La gazeto DIA REGNO reaperas. Krom en Nederlando nun ankaŭ fondiĝis protestanta Esperanto-Ligo en Germanujo.

Sur Nia Librotablo.

Recenzo de novaj libroj de internacia intereso.

En Esperanto :

Manifesto de la Sennaciistoj. 32 pĝ., New York 1931, havebla ĉe T. Veder, 24-29 Merchant Str., Astoria, N. Y., Usono.

Interne de la proletaria Esperanto-movado organizita en SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) speciala idearo de ĝia fondinto kaj gvidanto E. Lanti kyskigis movadon « sennaciistan », kiu tamen nur enhavas parton de la SAT-anaro. Ĝi estas diferencita de la kutima socialismo, komunismo kaj anarkiismo kaj bazas sur la ideo de la « progreso » kaj « artefariteco ». Ne nur la politika registemo, la ŝtata formo kaj la atakanta arogantece de la nacioj devas esti detruataj, sed la nacioj mem devas forigi. Esperanto ne estu la dua lingvo apud la gepatra, sed ĝi forigu la naciajn lingvojn kaj okupu ilian lokon. Kontraŭe al la bolŝevistoj la sennaciistoj konsideras ankaŭ la naciajn liberigbatalojn de subpremitaj nacioj kiel « reakciaj ». La filozofia fundamento de la sennaciismo estas speciala speco de materialismo, ĝi estas same kontraŭreligia kiel ĉiu alia speco.

Arthur Azevedo-A. Couto Fernandes, Amo per proverboj, unuakta komedio, dua eldono, 24 paĝoj, Brazila Ligo Esperantista, Rua Marechal Floriano, 212, Rio de Janeiro, Brazilo, 50.40 sv. fr.

Inter la multaj teatraĵetoj en Esperanto troviĝas malmultaj, kiuj vere taŭgas. Sed « Amo per proverboj » estas ĉarma laŭ enhavo, simpla por ludado, klasika laŭ stilo kaj traduko, 2 viraj kaj 1 virina roloj. La aŭtoro estas fama en la brazila literaturo, la tradukinto same fama en la Esperanto-movado.

Arbeiter-Esperanto-Bund, Esperanto nach grammatikalischer Lehrmethode, 96 pĝ., Berlin 1932, AEB, pr. 1.— RM.

Lernolibro lingve bona kaj plaĉe aranĝita. Ke la sufikso -uj- por landnomoj estas elmodiĝinta kaj ke « oni » nun uzas -io-, estas nekorekte kaj neaprobinde. Pro la bolŝevista tendenco de la ekzercaj frazoj kaj artikoloj la libro ne taŭgas por niaj rondoj.

G. W. Barnert, De viandomanĝado al senvenena dolĉfrukta dieto, trad. K. Froding, 16 pĝ., Madison 1932, Amerika Esperanto-Instituto, Madison, Wis, Usono, pr. 10 cendoj.

Meritas simpation, ke oni ne trinku alkoholon, ne fumu kaj ne manĝu viandon. Sed ĉi tiun libreton ni ne povas rekomendi al tiuj, kiuj volas fariĝi vegetaranoj. Ili tuj perdis konfidon kaj kuraĝon. Ke oni ne manĝu lakton, panon, terpomojn, legomojn kaj nuksojn kaj vivu nur per dolĉaj grandfruktoj, nepre estas troigo.

La grandioza monumento al Jesuo Kristo sur monto Corcovado apud Rio de Janeiro. Poŝtkarto havebla de A. Couto Fernandes, Rua Alice 65, Rio de Janeiro, Brazilo, pr. por 4 kartoj 1 respondkupono (0.25 RM.).

La monumento estas 38 metrojn alta, la Corcovado-monto havas 710 metrojn. La poŝtkarto kun Esperanto-teksto meritas rekomendon, kvankam bedaŭrinde la tekniko de la preso ne estas perfekta.

En franca lingvo :

S. I. P. U. C., I-er Congrès International de Presse de la Jeunesse Universitaire catholique à Lille (4, 5 et 6 mars 1932), Compte-rendu, 150 paĝoj, Secrétariat International de Presse Universitaire Catholique, 125-127, rue Meurein, Lille (Nord), Franc., 10 fr. fr.

Pri la kongreso de Lille ni raportis. Nun aperis la raportlibro, kiu enhavas ne nur la plenan tekston de la raportoj kaj paroladoj kaj la protokolon de la diskutoj, sed ankaŭ riĉan materialon pri la tutmonda katolika universitata gazetaro. La volumo grandformata estas ornamita per bildoj kaj karikaturaj, enhavas gravajn dokumentojn kaj estas nepre necesa por aktivaj katolikaj « internaciuloj ». Ni ĝoias vidante, ke en la raporto de la vicepresidente de Pax Romana, Roger Pochon, ankaŭ nia gazeto LA JUNA BATALANTO estas pritraktata. Li diris, ke ĝi ja ne estas nura studenta gazeto, tamen estas multe legata de studentoj internacie interesataj. Ni rekomendas la raportlibron, kiu ja estas malmultekosta.

Nous voulons la Paix, Concentration des efforts universels des forces pacifistes, sous le haut patronage du ministère des affaires étrangères, 384 pĝ., Paris 1932, S. R. I. P., 14, Rue de Richelieu, pr. 10.— fr. fr.

Tre grava volumo enhavanta amason da materialo necesa por la aktivaj laborantoj de la paca movado. La plej granda parto servas la francan-germanan interkompreniĝon, kaj la pacaj asocioj de ambaŭ landoj estas detale priskribitaj. Bedaŭrinde la faktoj pri la germanaj asocioj estas tre nefidindaj kaj parte tute eraraj. Ekz. MOKA estas pritraktata (sub ĝia germana nomo) inter la — virinaj ligoj, kaj oni tradukas ĝian nomon franclingven « Ligue mondiale de la femme catholique ». Oni skribas, ke la germana MOKA-sekretariejo en Düsseldorf eldonas la gazeton LA JUNA BATALANTO, kiu estas aldono al KATOLIKA MONDO (la verko aperis en 1932!). Fine sub la junularaj ligoj ankoraŭfoje troviĝas MOKA, sed nun sub anglalingva nomo. Kaj kiel adreson oni nomas la domon, en kiu nia amiko Kurt Döbler antaŭ 4 jaroj loĝis kiel Berlina MOKA-deligito. Leteroj tien sendataj kredeble perdiĝos. Domaĝe! Pri aliaj asocioj ni povus doni similajn ekzemplojn. Pri Francujo la dokumentoj estas pli fidindaj, kredeble la lingva malfacilaĵo

estas kulpa je la strangajoj pri Germanujo. Grava en la libro estas la artikoloj pri « la moralaj fortoj en la servo de la paco ». Ili komenciĝas per bonega artikolo « La misio de la Katolika Eklezio » de episkopo Béguin de Belley. Sekvas artikoloj pri protestantismo, framasonismo, pozitivismo, poezio, teatro, filmo kaj iliaj rilatoj al la paco. Estas ja kuriozaĵo, ke en libro eldonata sub patroneco de la Ministerio por Eksterlandaj aferoj povas troviĝi 30-paĝa dokumentaro pri rifuzo de militservo (cetere tre leginda, kun citaĵoj de katolikoj kiel Abbé Bach, Pastro Stratmann, O. P., Pastro Keller ktp.) kaj tiel radikalaj artikoloj kiel tiuj pri « la aritmetiko de la frenezeco kaj de la teruro », « la milito de morgaŭ » ktp. La verko estas grava dokumentaro rekomendinda al gvidantoj, al kiuj ĝi disponigas akrajn batalilojn — por la paco.

En angla lingvo :

Cyprian Emanuel, O. F. M., The Ethics of War, 56 pĝ., 1932, The Catholic Association for International Peace, 1312 Massachusetts Avenue, N. W., Washington, D. C., pr. 10 cendoj.

La Etika Komitato de la Amerika Katolika Paca Ligo denove eldonis interesan raporton ĉefe kompilitan de kompetenta franciskana profesoro. Oni zorge studis la instruojn de la moralteologio rilate al la milito. Plej klare estas montrataj la kondiĉoj de justa milito laŭ Sankta Tomaso kaj Francisko de Victoria. La aŭtoro konkludas, ke sendube la tempo ne estas malproksima, kaj eble ne estas neverŝajne diri, ke ĝi jam estas veninta, kiam ĉiu milito grandskala inter grandpotencoj fariĝas nemorala kaj nepermesita. — En la katolika popolo multaj jam venis al la konkludo, ke en la modernaj cirkonstancoj estas tute necble, ke la kondiĉoj de « justa milito » laŭ la skolastikaj teologiistoj ankoraŭ povas ekzisti. Do la doktrino pri la « justa milito » fariĝis historia afero, kaj ĉiu moderna milito estas tiom malmorala, ke ni nepre devas ĉiel kontraŭbatali ĝin.

En germana lingvo :

Else Hocks, Der Schatz im Acker, Roman, 280 pĝ., Werl i. W. 1932, Verlag Erwachende Jugend, pr. 2.50 RM.

Romano verkita de la antaŭa vicprezidantino de la Paca Ligo de Germanaj Katolikoj kaj eldonita de la konata MOKA-eldonejo. Do duoble interesa al niaj legantoj. La heroo estas junulo, kies liberpensula patro edukas lin en plena ignoro kaj eĉ nekono de la kristanismo. Per kuzino li venas en kontakton kun la monaĥejo Timor Dei, en kiu aperas al li la tuta riĉeco de la katolikismo. Li decidas kristaniĝi. Subite komenciĝas la milito. Li vizitas la episkopon kaj interparoladas kun li pri la milito kaj la sinteno de kristanoj al ĝi. Li venas inter la popolon. Je unu flanko furiozas militaristoj, je la alia la aro de tiuj, kiuj volas transformi la militon en sangan revolucion. Frowin predikas pacon al ambaŭ, du kugloj trafas lin samtempe, unu de dekstre kaj unu de maldekstre... La libro estas leginda. La teknika aranĝo estas bonega, salutinda progreso kompare al antaŭaj eldonaĵoj malpli perfektaj.

En germana lingvo :

H. J. Wagenbach, Volk und Boden, mit einem Vorwort von A. Damaschke, 64 paĝoj, Potsdam 1932, Alfred Protte Verlag, broŝ. RM. 1.20.

La juna kaj kapabla ĉefsekretario de la Ligo de Germanaj Terposedreformuloj (Bund Deutscher Bodenreformer), D-ro Wagenbach, eldonis gravan verkon pri «popolo kaj tero», kiun li sendas al ni por recenzo kun samtempa sciigo, ke en lia domo komenciĝis Esperanto-kurso. En klara, konciza, scienca kaj tamen facile komprenebla maniero ni konvinkigis pri la graveco de la tero kaj de ĝia justa posedo. La reordigo de la popolo kaj ĝia liberigo de la ekonomia mizero estas necbla sen solvo de la terposedproblemo. Teron kaj liberecon!

KATALUNA ANTOLOGIO estas unu el la plej gravaj literaturaj verkoj en Esperanto. Ĝi estas admirata en la tuta mondo kaj enkondukas en la literaturon de tre interesa, sed malmulte konata popolo. La prezo de la 416-paĝa volumego belege presita estas nur 4.— RM. **Mendu de la Eldonejo LA JUNA BATALANTO!**

Nia Movado.

Internacia Oficejo.

La internacia sekretario de MOKA estas dum la tempo, kiam ĉi tiu gazeto alvenas ĉe la plimulto de niaj gelegantoj, sur la ŝipo, kiu portas lin al Ameriko. Ĝis komence de aprilo li ne povas respondi leterojn. Tre urĝaj sciigoj estu sendataj al jena adreso : Dr. Wilhelm Solzbacher, c/o Adult Education Council, 224 S. Michigan Avenue, CHICAGO, Ill., Usono.

Anglalingva varbilo por MOKA, Esperanto kaj LA JUNA BATALANTO aperis. La teksto troviĝas en la mezo de ĉi tiu numero. Tamen la 4-paĝa flugfolio estas presita sur tre bona blanka papero. Niaj geamikoj bone uzu la propagandfolion por disvastigo en anglalingvaj rondoj. 10 ekzempleroj kostas samvaloron de 0.25 RM, 25 ekz. samvaloron de 0.50 RM. Ni ankaŭ tre ĝojus, se partoj de la flugfolio estus utiligataj por artikoloj en gazetoj aŭ ĵurnaloj. Cito de la fonto tiukaze ne estas necesa.

Eldonejo LA JUNA BATALANTO.

Ĉi tiu numero estas la lasta de la 7-a jarkolekto. La sekvonta numero estos tiu de majo 1933, sed ni klopodos jam aperigi ĝin dum aprilo. La unuigo de la januara kaj marta numeroj okazis pro la foresto de la redaktoro en Ameriko, sed ankaŭ por eviti deficiton, kiu estus estinta neevitebla. Niaj gelegantoj ja ne havas perdon, ĉar kelkaj numeroj estis pli ampleksaj, kaj sume ili ricevis pli multe da paĝoj ol per ses numeroj kun ordinara amplekso.

La lasta jaro estis en la unuaj monatoj pli sukcesa por ni, ol ni estis esperintaj, sed poste la enspezoj konsiderinde malpliigis. Ja venis multe da novabonoj, sed el la malnovaj abonantoj granda parto simple forgesis sendi la abonprezon. Se ĉiuj estus farintaj sian devon, pagante la gazeton, kiun ili mendis kaj regule ricevadis, nia situacio estus brila. La hezitemuloj bonvolu nun tuj sendi la abonmonon! Kompreneble ĉi tiu admono ne valoras por tiuj, al kiuj ni promesis senpagan liveradon...

La nova jaro komenciĝos por La Juna Batalanto la 1 aprilo 1933. Ni petas ĉiujn gelegantojn, laŭeble tuj sendi la abonprezon por la jaro 1933/34.

Aŭstrujo.

Wien. Nova kurso por komencantoj, daŭriga kurso por progresintoj (ekzercado, tradukado, okupiĝo pri katolika paco-kaj abstinco-movado, kantado) en Krucligo, Wien I., Judeuplatz 8/1., ĉiujauĝe de la 19a - 21a. Partoprenas proks. 15 personoj, gvid. W. Mudrak. — Nova kurso por komencantoj ĉe ĉefaj katolikaj « Orel » (gimnastik-) ligoj en Wien XII., ĉiulunde. Partoprenas 18 gejunuloj. Fervore klopodas por la afero S-ano Josef Krenek. Kursgvidanto W. Mudrak. — En la komuna Zamenhof-soleno de la Vienaj Esperanto-unuigoj oni prezentis parton el la simbola ludo « Kunlaboro » de W. Mudrak publikita de la Eldonejo LA JUNA BATALANTO. La ludo ŝajnas trovi bonan akcepton en la Esperantistaro, diversaj gazetoj enhavis favorajn recenzojn. — En la Katolika Unuigo Esperantista okazas serio de prelegoj pri la *Konfeso de Sankta Aŭgusteno* kun komentario, tradukitaj el la latina originalo de S-ano Nik. Hovorka.

Cehoslovakujo.

18 katolikaj skollaj grupoj aranĝas Esperanto-kursojn.

Francojo.

Kelkaj gravaj gazetoj enhavis detalajn anoncojn pri LA JUNA BATALANTO : « Les Annales de la Jeunesse Catholique », oficiala organo de la Franca Katolika Junulara Asocio (A. C. J. F.), « Catho », organo de la katolikaj studentoj en Lille, kaj « L'Aube Nouvelle », revuo de « Le Sillon Catholique » (Katolika Sulko).

En diversaj kunvenoj la novaj franclingvaj flugfolioj de MOKA estis disdonataj.

Germanujo.

Multaj paroladoj de la nacia sekretario (speciale pri siaj spertoj en Sovetujo) kaj de la internacia sekretario, precipe en Stuttgart, Köln, Bückeburg.

Gazeto « *Der Friedenskämpfer* » (Pachatalauto) enhavis anoncon pri LA JUNA BATALANTO. Kalendaro « *Christlicher Familien-Kalender* » enhavis efikan artikolon pri Esperanto, verkitan de nia amiko Breilmann (Essen).

Düsseldorf. La Pestalozzi-Instituto (pedagogia instituto de MOKA) eldonis cirkuleron, el kiu ni citas : En preskaŭ 12-jara agado la instituto (resp. la grupoj antaŭirantaj ĝian formadon) formis profesie pli ol 500 junajn homojn en pli ol 40 kursoj (= 1600 instrueroj) kaj formis politike pli ol 12.000 homojn en 500 publikaj kaj politikaj kunvenoj kaj aranĝoj. Per pli ol 40 vojaĝoj al eksterlande kaj partopreno je la plej gravaj naciaj kaj internaciaj kongresoj estiĝis tiuj rilatoj trans la limoj, kiuj faris la instituton konata en kaj eksterlande kaj ebligis al ĝi, fariĝi centro de vera popola kaj homara klerigo... Interesuloj postulu prospektojn de H. Kolvenbach, Düsseldorf, Stoffeln 23.

Köln. Nia amiko Max Henrichs, prezidanto de la EKARO, estis elektata kiel konsilanto en la Loka Organiza Komitato de la 25-a Universala Esperanto-Kongreso. Li zorgos, ke la katolika partopreno sukcese organiziĝu.

Miltenberg. Novan metodon de kolektiva korespondado eltrovis la vigla Esperanto-grupo, konsistanta el katolika studanta junularo, per monata publikigo de « letero el la tuta mondo » sub la titolo « Saluton! ». Junuloj ĉiulandaj, kiuj deziras interesan korespondadon kaj viglajn rilatojn internaciajn, skribu al Pastro prefekto Ferd. Kiessner, Miltenberg a. M., Kiliancum, Germanujo. Ni gratulas la fervorajn eldonantojn de « Saluton » kaj varme rekomendas ilian agadon.

Internacia Helpservo. En Berlin okazis konferenco de gvidantoj de la germana paca movado pri la ebleco de internacia libervola helpservo en Germanujo. Estis elektata komitato, en kiu sidas nia amiko August Günther (Werl).

Kubo.

Habana. Pastro Agustin Lopez fariĝis Delegito de MOKA.

Saar-Regiono.

Okaze de franca-germana limkunveno junulara, kiu okazis je Novjaro en la honorinda pilgrimejo Blieskastel kaj en kiu kelkaj MOKA-anoj partoprenis, la germana MOKA-sekretario pritraktis kun diversaj geamikoj la plivigligon de la MOKA-movado en la Saar-Regiono. Nia amiko Tabellion organizos la tiean branĉon de MOKA. Ankaŭ Patro Manfred O. M. Cap. promesis kunlaboron.

Svisujo.

La katolika junulara gazeto « *Jungmannschaft* » enhavis anoncon pri LA JUNA BATALANTO. Novaj abonantoj estas varbitaj.

Usono.

Diversaj amikoj de MOKA vigle helpis en la lasta tempo, kaj nun ekzistas tute eksterordinaraj ŝancoj por nia movado en tiu lando. Des pli bone estas, ke ĝuste nun la internacia sekretario de MOKA iros por du monatoj al Ameriko. Ni preferas, nun ne paroli pri detaloj, sed ni certe esperas, ke la venonta numero de LA JUNA BATALANTO povos raporti pri bonaj sukcesoj.

NATURSCIENCO, Mondkoncepto, Religio, la bonega, grandformata, 164-paĝa verko de Profesoŝo Reinke, ankoraŭ ne trovigas en via posedo? Mendu ĝin por nur 1.— RM! Eldonejo LA JUNA BATALANTO.

“ CATHO ”

Organe bi-mensuel de la Fédération des Etudiants de l'Université Catholique de Lille (France).

Lue dans trente-quatre pays, c'est une des meilleures revues estudiantines catholiques.

Abonnements :

	France et Colonies	Etranger	Union Postale
Etudiants	15 Frs français	20 Frs	18 Frs
Ordinaires	25 » »	30 »	28 »
D'Honneur	50 » »	60 »	55 »

LE NUMÉRO : 2 FRANCS

Adresse : 125, rue Meurein -- LILLE (Nord) France.

Compte Chèques-Postaux CATHO 379.03 — LILLE

“ Service d'Information du S. I. P. U. C. ”

Secrétariat	} « Organiser solidement, techniquement, la presse Universitaire Catholique pour lui permettre d'exercer avec plus d'efficacité son action bienfaisante sur les élites intellectuelles de tous les pays. — Renseigner cette Presse tout comme le ferait une grande Agence d'Information. — Se servir d'elle comme de l'Instrument par excellence de la collaboration internationale, pour élargir les esprits « aux dimensions du monde » — Et pour cette belle entreprise développer entre tous les journaux et revues universitaires, un esprit de solidarité, une volonté d'entraide désintéressée. Voilà ce que signifient les cinq initiales S. I. P. U. C. »
International de	
Presse	
Universitaire	
Catholique	

Le Service d'Information

Paraît tous les deux mois sauf pendant les vacances.

Résume et classe les articles parus dans près de 300 revues du monde entier. Annonce les principales manifestations des étudiants. Donne des conseils pratiques de journalisme. Contient une documentation unique, indispensable pour tous ceux qui s'intéressent aux mouvements de jeunes. Les étudiants, les professeurs, les ecclésiastiques, et en général tous les intellectuels trouveront grand profit à le lire régulièrement.

Tarifs des Abonnements (pour tous pays) :

Ordinaires	De Soutien	D'Honneur
10 Francs français	20 Francs	A partir de 50 Francs

Pour connaître les origines et le but du S. I. P. U. C., lisez le

Compte Rendu du premier Congrès International de Presse de la Jeunesse Universitaire Catholique.

150 Pages, nombreuses illustrations. Prix France 10 Frs — Etranger 12 Frs.

— S. I. P. U. C., 125-127, rue Meurein, LILLE-FRANCE —

Compte Chèques-Postaux Dhont, 373-50 — LILLE

REDAKTAS KAJ ELDONAS:
 La jaro
 Sin intereso

Majo
 1932

La 18-a de Majo

la Praktiko
 LA GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS

INTERNACIA
 CSEMINISTITO
 DE ESPERANTO
 KONTO: DEN HAAG
 (Nederlando)
 PUBLIKITA PER
 M. G. DE VRIES

Monata
 ekzercita gazeto,
 Ricega kaj interesege enhavo
 instrua kaj amuza.
 Trezorejo por progresantoj,
 grupoj kaj studindoj,
 Valeraj lingvaj lecionoj,
 interesaj konkuroj kun multaj
 premioj.

ABONPREZO :

1 jaro - 1.-- usona dolaro
 1 2 ,, - .50 ,, "

La abonon oni povas sendi
 en simpla letero per post-
 markoj de kiu ajn lando.
 Tia, kiu abonas la 2-an jar-
 kolekton (1933), povas ricevi
 la unuan jar kolekton (1932)
 por duona prezo.

SPECIMENO SENPAGE !

Adreso :
LA PRAKTIKO,
Oostduinlaan 32,
DEN HAAG (Nederlando).

DER GROSSE HERDER

12 Bände
 u. 1 Welt- und
 Wirtschafts atlas

Wissen der Gegen-
 wart
 Fürs praktische
 Leben
 Rat und Führung
 Für Geist und
 Seele

Auskunft beim Buchhändler
 oder bei Herder, Freiburg i. B.

**HERDERS
 WELT UND
 WIRTSCHAFTSATLAS**

Mit dem Statistikband
**DIE WELT
 IN MASS
 UND ZAHL**

In Halbheften 42,50 Mark
 GROßDRUCK BEIM BUCHHÄNDLER